



Kulturaj Kajeroj

É.M.A.N.É. →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

JARABONO :

Simpla : 3 fkoj Sendotaj al : Micard Henri
Subtena : 5 fkoj Kulturaj kajeroj
Bonfara : 10 fkoj Epineux-le-Seguin (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pagó 4)

SEPTEMBRO - OKTOBRO

1960

5

KULTURAJ KAJEROJ

1960

Septembro Oktobro

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatoj :

René Watier
Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

Promesis kunlabori en 1960 :

William Auld (Britujo)
Julio Baghy (Hungarujo)
Delfi Dalmau (Hispanujo)
Alberto Barrocas (Urugvajo)
Hannes Koivu (Finnlando)
Robert Martin (Francujo)
Eugeniusz Matkowski (Pollando)
William Perrenoud (Svislando)
M. de Waard (Nederlando)

kaj aliaj diverslandaj elstaraj esperantistoj

ENHAVO

Titoloj kaj Gradoj — M. de Waard.

Esperanto tra la mondo.

TURISMO :

Bretonio (Fino) — R. Martin.

Baugé, « juvelujo » de Grésillon.

EL IE EN LA MONDO :

David d'Angers, internacio skulptisto, B. Chevery

Finna banejo — Hannes Koivu.

La Insulo de l'Okcidento (fino) J. Masfield
(tr. A.J. Hughes).

Gramatika paĝo — Prononcado kajskribado.

Tra la Esperanta literaturo — Vallienne Henri,
Franco (D-ro Kuracisto).

Por via distro — Nia Konkurso.

La Junaj Detektivoj (4-a parto) — J.H. Sullivan.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

NI FOSU NIAN SULKON !

Okaze de la apero de la artikolo de Sro J. Regulo-Perez en la 3-a numero de *Kulturaj Kajeroj* pri la diskuto « ata-ita » kaj titolita « No fosu nian sulkon ! », ni ricevis plurajn leterojn kaj eĉ artikolon. Parto el ili estis favora, parto malfavora al la opinio prezentita en tiu artikolo. Ni dankas la sendintojn, precipe Srojn Ciliga kaj Marly, kiuj tiel montris sian intereson pri nia revuo kaj pri gramatikaj aferoj. Sed, ĉar la redakcia komitato de « *Kulturaj Kajeroj* » ne deziras partopreni en iu ajn kverelo, ĝi decidis ne estigi diskutadon en la revuo.

M. DE WAARD skribis por vi :

TITOLOJ KAJ GRADOJ

Por interŝanĝo de reciproka kono — mi jam ofte martelis sur tiu ĉi amboso — Esperanto estas unuaranga helpilo. Facile oni ja povas deklami pri tutmonda frateco aŭ pri tuteŭropa kunlaboro, sed la penado restos senfrukta, se la popoloj ne ekkonos unu la alian. Profundan veron ja entenas la proverbo « nekonata faras neamata ».

Plej bone oni ekkonas alian nacion, kiam oni studas ĝiajn morojn kaj kutimojn, konatiĝas kun ĝiaj aspiroj. Ankaŭ scio pri la instruado en aliaj landoj — en Grésillon ofte traktita temo — estas grava.

En ĉiuj landoj la altlernejoj kaj universitatoj formas la supran klason de la instrusistemo kaj per tiu supera instruado oni povas akiri titolojn aŭ gradojn.

Legante dum multaj jaroj la Esperanto-gazetaron mi konstatis, ke la valoro kaj signifo de akademiamaj gradoj kaj titoloj estas malegalaj en pluraj landoj : Komence mi kredis, ke en niaj Esperantistaj rondoj la scienculoj abundas, ĉar mi renkontis tiel ofte la titolon « profesoro », kiu en mia lando estas rezervita al universitataj docentoj. Poste mi komprenis, ke en aliaj landoj ankaŭ instruisto en gimnazioj kaj similaj institucioj estas profesoro.

Ankaŭ la doktoroj kaj inĝenieroj ne estas egalvaloraj en ĉiuj landoj. Esperantisto do restu singarda en uzado de sia titolo, por ke li ne ŝajnu fanfaronulo aŭ sin taksu tro alta. Ekzemple : mi persone estis ĉiam neagrabla ŝokata, kiam mi vidis en Esperanta revuo mian nomon ornamita per la epiteto « inĝeniero », ĉar laŭ nederlanda kompreno mi ne estas tia ! En Nederlando nur tiu, kiu trapasis la altlernejojn teknikajn rajtas sin nomi « inĝeniero ». Miaj kolegoj kaj mi, trapasintaj mezgradan (superan) teknikajn lernejojn, havas nenian akademian titolon, kvankam nia studo eble egalvaloras al tiu de germanaj aŭ alilandaj inĝenieroj. Laŭ mia informiĝo en tiuj

aliaj landoj la vera inĝeniero sin nomas « diplomita inĝeniero ».

Kaj tiel mi venas al la celo de mia nuna artikolo : ni interŝanĝu la signifon de niaj naciaj akademiamaj gradoj kaj titoloj por eviti miskompreno aŭ vantan pompadon. Mi aldonu tie ĉi, ke unu popolo estas pli titolama ol alia. Miaj samlandanoj ŝajnas tiurilate tre modestaj kompare al aliaj, kiuj volonte sin alvokigas per « sinjoro doktoro », « sinjorino instruist-edzino » (!) kaj aliaj belaj ornamaĵoj. Antaŭ 25 jaroj mi estis gasto de ĉarma sinjorino blankhara en skandinavia hejmo. Ĉiumatene ŝi alparolis min jene : « ĉu **sinjoro** la **nederlanda prelegofaranto** bone dormis ? »... En ŝiaj oreloj la simpla uzo de « vi » sonis ofende !

Estus do interese, se vi klarigus sur la paĝoj de tiu ĉi revuo la titolsistemon de viaj landoj. Krome estus sciinda ĉu la titoloj kaj gradoj estas lege protektataj kontraŭ fraŭda uzo kaj ĉu oni uzas la titolojn en la ĉiutaga konversacia interrilato.

Jen la ekzemploj nederlandaj :

Akademiamaj titoloj estas nur inĝeniero, magistro kaj doktoro.

Inĝeniero estas tiu, kiu akiris plej altan diplomon de teknika altlernejo. Post verkado kaj defendado de disertacio la inĝeniero povas akiri la gradon de « doktoro de teknika scienco ». La alparolo estas ĉiam nur : sinjoro.

Magistro estas tiu, kiu plenumis lastan ekzamenon en la jura fakultato de universitato. Post verkado kaj defendo de sia disertacio magistraro fariĝas « magistro doktoro ». Oni alparolas lin per sinjoro aŭ kelkfoje per magistro.

Tiu kiu plenumis sian doktorigan ekzamenon en fakultato ne estas doktoro. Tiucele li devos verki sian disertacion. Nur post tio li rajtas skribi antaŭ sia nomo « d-ro ». Oni alparolas lin per sinjoro escepte la kuracistojn, kiuj eĉ sen la doktora grado estas vokataj « doktoro ». (Neniam sinjoro-doktoro !)

Esperanto tra la Mondo



UNIVERSALA KONGRESO DE BRUSELO.

Preskaŭ 2.000 esperantistoj ĉeestis. La unua sekcio « Esperanto en la lernejo » rekomendis al UEA daŭrigi la kampanjon « Esperanto kiel baza lingvo » kaj intensigi la klopodojn por subskribo de interŝtata konvencio.

La dua sekcio : « Kontribuoj de esperanto al la granda projekto de UNESKO Oriento-Okcidento » sugestis ampleksajn interŝanĝojn de personoj kaj kulturaj materialoj.

— 87 infanoj el 9 landoj aliĝis al la Infana Kongreso.

— 80 blinduloj el 13 landoj ĉeestis la kunvenojn de la blindaj esperantistoj.

— La oficiala teatraĵo : « Kurioza Okazaĵo » de Goldoni, prezentita de Internacia Arta Teatro, havis grandegan sukceson dank'al, la perfekte de la artistoj.

— La Universala Kongreso 1961 okazos en Harrogate (Britujo).

— Pli ol 100 gejunuloj partoprenis en Rotterdam, la 16 a Internacia Junulara Kongreso kaj 62 personoj el 19 landoj ĉeestis la seminarion por Cseh-instruistoj.

NOVAJ ELSENDOJ DE « LA VOĈO DE AMERIKO »

— La « Voĉo de Ameriko » dissendos 30 minutojn radio-programojn en esperanto, pri la usonaj balotelektoj, la 21an kaj 28an de oktobro kaj la 4an de Novembro. Ĉiu programo estos disaŭdigata kvarfoje por atingi la diversajn partojn de la mondo.

LA INTERNACIA MONO NUN ANKAŬ EN FORMO DE MONEROJ.

— « Universala Ligo » kiu jam estis enkondukinta la internacian monunuon « stelo » en formo de kuponoj, ĵus lanĉis ankaŭ monerojn, nome de 1,5 kaj 10 steloj, faritaj de la ŝtata monfarejo nederlanda. Tiu monero helpas al plisimpligo de kurzaĵ komplikaj por esperantistoj kaj eventuale por anoj de aliaj organizoj internaciaj.

FRANCUJO. — En urbeto Montreuil-Belfroy apud Angers oni inaŭguris straton Esperanto. Multaj gesamideanoj el la Kultur-Domo ĉeestis la inaŭguron.

HUNGARUJO. — Oni esperas en 1961 refondi landan Esperanto-societon kaj eldoni, krom monata informilo ankaŭ ilustritan kulturalan kaj socian revuo. Oni inaŭguris novan Zamenhof-straton en la urbo Miskolo, kiu posedas ankaŭ Esperanto-placon.

IZRAELO. — Dro Zamenhof-strato estis oficiale inaŭgurita en la urbeto Kfar.

SOVET-UNIO. — 108 esperantistoj el Estonio, Litovio, Latvio, Moskvo kaj Moldavio partoprenis Esperantan Junularan Tendaron organizitan en aŭgusto, de la esperanta studenta rondo de la Universitato de Tartu.

AUTUNAJ INTERNACIAJ ESPERANTO-KURSOJ. — Ilaj okazos de la 16a ĝis la 23a de oktobro en sporta altlernejo de Vezle (Danlando). Skribi por informoj al S-ro L. Friis, Ingemannsveg 9, Aabyø, Danlando.

LIBROJ EL ĈINIO. — Eldoniĝis la dua volumo de esperanto-lernolibro por komencantoj. Entute, la volumoj ampleksas 373 paĝojn.

Aperis « Cina Antologio » (1949-1959) de 412 paĝoj kaj vortaro esperanto-ĉina estis jam antaŭe publikigita.

NORD-VIETNAMO. — En Nord-Vjetnamo aperis pluraj libroj en esperanto, el kiuj « Monto de l'Virino », kolekto de vietnamaj legendoj.

INTER LA POŝTISTOJ. — Reaperas « La Interligilo », organo de la Esperantistaj poŝtistoj, sub la kromnomo de : « Poŝta telekomunikata Revuo » (20, avenue de Ségur, Paris 7).

NOVA VORTARO. — Kompleta nova vortaro « franca-esperanta » aperos fine de la jaro. La aŭtoroj estas S-roj Léger kaj D-ro Albault.

Bretonio vin Vokas !

FINO

Vin mi petegas, ne legu ĉi tion, kiu eble tute malhelpos vin dormi venontan nokton aŭ donos al vi premsonĝojn ! Jes, ho ve ! en Judigon oni ĵetis ĉiujn vagantajn animojn, kiuj maltrankviligis la vivantojn. Kelkaj pastroj havis la povon ekkapiti ilin kaj aliformigi ilin en trankvilajn kaj obeemajn hundetojn !... Oni dungis iun sentimulon por konduki ĉiun besteton al la Judigo. Li devus iri piede, loĝante nur en pastrejoj... Se estas vi, leganto, kiam vi estas apud la truego, nur nokte ekprenu la besteton dumane kaj ĵetu ĝin kiel eble plej malproksimen... sed ho, pro la diamo ! kia ajn estos la bruo, kiun vi aŭdos aŭ la spektaklo vidota ne ellasu la plej etan krion aŭ vorton, malantaŭen kuru kvarpiede kaj ne

turnu la kapon, ĉar alimaniere vi mem irus al la Judigo miksi viajn kriojn al la aliaj kaj neniam plu oni revidus vin ! Tremu ankaŭ ! Ho ve ! nun Judigo ankaŭ estas dronita kun kredeble la malfeliĉaj animoj, kiuj jam de jarcentoj plenigis ĝin ! Baldaŭ eble la memoro pri tio ĉi malaperos el inter la homoj. Reĵetoj moderneco mortigis poezion !...

Nun reen survoje al Sudo ! Ni renkontos aliajn lokojn : jen Braspart kaj post dek aliaj kilometroj Plejben kun ĝia granda placo, ĝiaj belegaj preĝejo kalvario, triumfarko, ostajejo. Ankoraŭ dek aliajn km. kaj ni estos en la distrikta pitoreska ĉefurbo Chateaulin meze de la bluaĵ montetoj varme kuŝanta ĉe la fundo de bela valo ambaŭflanke de serpentinanta kanaligita rivero Aulne, Mezurbe, rektangle, ni alivojiĝu kaj iru la vojon al Crozon (bretonne Craon). La vojo nun grimpas. Post malpli ol dek km. ni haltu ! Ni estas apud la belega kapelo de Menez-Hom, staranta ĉe la flanko de la samnomata monto kies suprajn ni baldaŭ atingos. Ho la belega panoramo ! Cirkatadmuru !... Sude ĉe la riĉa kamparo de Porzay la monteto de Lokronan, la golfeto de Douarnenez, ĉiel (aŭ pli) bela laŭ multaj onidiroj, kiel (ol) tiu de Napolo, kaj sub kiu dormas Ys nia malvirtema ĉefurbo. Direktu nun viajn rigardojn

norden kaj vidu la urbon Brest kun ĝia rodo, unu el la plej admirindaj kaj vastaj. Ĝi estas sufiĉe ampleksa por enloĝigi la ŝiparojn de la tuta mondo. Rigardu nun ĉe viaj piedoj : tiu ŝtonamaso estas laŭ malnova tradicio la tombo de la reĝo Marko, onklo de Tristan kaj reĝo de nia Cornouaille. Ni eniru nun en la longan kaj krucforman duoninsulon de Crozon. Vera mondo ĝi estas kiel eble plej varia laŭ multaj vidpunktoj. Ĝia subgrundo entenas multajn interesajn mineralojn, feron, porfiron, ametiston, ktp. Ĉi-tie vi trovos multe da lokoj por pasigi agrablajn libertempojn, interalie Camaret (bretonlingve Kamelet, t. e. kurba haveno). Ĝi certe, kiel baldaŭ vi vidos, valoras longan restadon, eĉ eble ĉiaman, kiel por la poeto St Pol Roux, kiu tien venis pasigi kelkajn tagojn kaj poste restadis pasigi sian ceteran vivon !

Camaret vere meritas sian almonon « restadejo de artistoj ». Nenombrebela estas la pentristoj, poetoj, romanistoj, teatraĵistoj kaj aliaj ĉiuspecaj verkistoj al kiuj Camaret inspiris iliajn ĉefverkojn. Ĝia pitoreskeco ne estas nun ĝia nura allogaĵo eĉ de la plej malnovaj bratempoj kiuj ĉi-tie postlasis multajn videblajn memorarojn. Nuntempe Camaret estas tre agema marhaveno malfermiĝinta sur la Atlantika Oceano. Ĝi estas el ĉiuj en Francujo la unua por kaptado de la krustuloj, precipe de palinuroj kaj ankaŭ de multaj fiŝoj, kiuj abundas ĉe ĝia proksimeco. Sed ankaŭ ofte la « Camaretanoj » iradas ilin kapti tre malproksimen.

Camaret kaj Bretonio kalkulus vin inter siaj plej fervoraj admirantoj ĉu ne ?

Antaŭ ol adiaŭi vin, karaj ĝelernantoj, mi diras al vi : eĉ se vi povus vivi multajn jardekojn, Bretonio la bela povos havigi al vi multajn aliajn interesajn vojojn. Venu kaj revenu ! Mi diras al vi « Kenavo ! » bretona vorto, kiu signifas « ĝis la revido ».

R. MARTIN.
(Fino).



Kempera Kanalo

BAUGÉ "juvelujo" de Grésillon


Vi jam konas preskaŭ ĉion pri Grésillon. Sed ĉu vi scias, ke ĉirkaŭ ĝi atendas vin mirindaĵoj?

Baugé enhavas 4.000 loĝantojn kaj situas sur la bordo de la rivero Couasnon ĉe grava voj-




La Rivero Couasnon

kruĉiĝo, meze de ondumantaj montetoj en tiu Anjou-a regiono tiom kantata de la poetoj pro ĝia mildeco. Kiam vi promenas tra la stratoj, rigardu dekstren kaj maldekstren kaj vi vidos malnovajn, pitoreskajn domojn kiuj memorigas, ke la urbedo estis preferata de la Reĝo René kaj liaj korteganoj. Plie Baugé estas la centro de tre interesa regiono inda je ekskursoj.



Malnovaj danoj



La Kastelo

La majesta kastelo estis rekonstruita de René de Anjou en 1455. Ĝia grandega ŝtuparo farita el unuŝtonaj ŝtupoj kaj ĝia ĉarpento estas rimarkindaj. La preĝejoj S-ta Petro kaj S-ta Laurento datumas de la XVII-a jarcento. La malsanulejo entenas malnovan apotekon kun belaj ligno-skulptaĵoj, mebloj kaj ujoj ĉiuspecaj tute sendifektaj, kiuj datumas de la XVII-a jarcento. Ankaŭ la kapelo estas mirinda




Kufo de Baugé-Aninoj

Baugé posedas ankaŭ pecon de la Vera Kruco ; ĝi estas riĉe ornamita. La Reĝo René multe ŝatis ĝin kaj, kiam li eksiĝis al Izabela de Loreno, la kruco de Baugé kun du transaj baroj fariĝis la Kruco de Loreno. La Fontano de Reĝo René meritas specialan atenton : farita el unu nura granitbloko, ĝi estis skulptita de Adolphe David per

diversaj tieaj fiŝoj kaj ĉasaĵoj. Ĉe la supro de la kolono, kiu staras meze de la fontano, vidiĝas medalionoj prezentantaj la Reĝon René kaj la artojn.


Okaze de promendo tra la urbaj stratoj la turistoj vidos : skulptitajn fasadojn, malnovajn kamenojn, pitoreskajn balkonojn, la ponto de la Feinoj, kie Cuérin de Fontaine kaj grupo de Skotoj venkis la Anglojn en 1421. Ciujare la « Caledonian Society » petas, ke la urbo Baugé hisu tie la du flagojn, la skotan kaj la francan, okaze de la datreveno de tiu batalo.



Malnova Strateto

Cirkaŭ Baugé la vizitindaj lokoj estas multaj kaj ilin oni povas atingi ĉu aŭtomobile, ĉu bicikle, ĉu kelkajn el ili, piede.

Survoje al Pontigné oni vidos dekstre la antaŭan leprulejon, kaj poste sekvinde maldekstran vojon oni atingos, meze de arbareto, dolmenon. En



La Dolmeno

Pontigné mem (5 km) la malnova preĝejo estas beleaga kun sia portalo kaj ĉefe siaj internaj skulptaĵoj kaj freskoj.

La arbaro de Chandelais kun siaj grandaj aleoj obligas tre agrablajn promenadojn. Oni tie vizitas grotojn kaj la kastelon de l'Aubérier, en kies parko kreskas tulip-arbo alportita tien de barono batalinta kun Lafayette en Ameriko.

La Vieil-Baugé proponas al la kuriozemulo sian XI-jarcentan preĝejon kun helika sonorilejo kaj tre diversaj internaj skulptaĵoj.

Pli malproksime estas vizitindaj la preĝejoj de Jarzé, Seiches, Cheviré-le-Rouge, Cuon, Jumelles, Fontaine-Guérin, Beaufort ; la kasteloj de Durtal, Le Lude, Landifer, Parpacé. Fine Angers estas nur 38 km, malproksima kaj Saumur 34 km.

Kial vi ankoraŭ hezitas ? Grésillon proponas al vi esperantan vivon, Baugé turismajn eblojn. Anoncu vin kiel eble plej frue por venonta Pasko aŭ somero. Ĝis baldaŭ !



Preĝejo de Vieil-Baugé

Vertika laŭ dokumentoj de la S.I. Baugé.
Kliŝoj : Cingla - Baugé.



EL IE EN LA MONDO

DAVID D'ANGERS

Internacia Skulptisto

1788 - 1856

Niaj samideanoj, kiuj, iam, malfermis la unuan paĝon de la bela libro « Sro TADEO » esperantigita de Grabowski kaj eldonita de la pola asocio, jam povis konatiĝi kun la nomo de David d'Angers, kiel franca skulptisto de medajlonoj pri la pola aŭtoro Mickiewicz.

Efektive, la nomo de David d'Angers estas ligita al ĉiuj lamaj famuloj, landaj kaj eksterlandaj, kies trajtojn li volis lasi al la posteularo, pere de skulptaĵoj art-valoraj.

Pro la internacieco de la verkaro de la artisto, la eklektismo de la tolerema politiko, la abnegacio de la homo, ni povas kredi, ke la legantoj de « Kulturaj Kajeroj » satos legi ion pri li.

David d'Angers naskiĝis la 12an de Marto 1788-a (do, unu jaron antaŭ la granda franca revolucio) en tiu provinco « Anjou » (pr. Anju), kie staras ankaŭ nia Esperantista Kulturdomo.

Lia patro, Louis David, jam estis ligno skulptisto, kaj varma respublikisto.

Ĉu per originaloj, ĉu per muldaĵoj, la preskaŭ tuta verkaro de la artisto estas reprezentita en la bel-arta muzeo de « Angers » : 55 statuoj, 20 statuetoj, 150 bustoj, 70 bareliefoj kaj 531 medajlonoj !

Li multe vojaĝis. Senese, li trakis Francujon, kaj restadis pli malpli longe en Germanujo, Belgujo, Nederlando, Britujo, Hispanujo, Italujo, Grekujo.

Inter la fama eksterlandanoj, li precipe modlis tiujn, kiuj en siaj landoj estis partianoj de libereco : Washington, Jefferson (Usono), Mickiewicz (Pollando), Kanaris (Grekujo), Bolivar (Venezuela) kaj aliaj malpli konataj.

La literaturistoj tenas la unuan rangon en la verkaro de David d'Angers :

La francoj de lia epoko : Victor Hugo, Sainte-Beuve, Chateaubriand, Lamartine, k.t.p. ; kaj el la fremduloj : Goethe, Chamisso, Schiller, Byron, Fenimore Cooper, Mrs Beecher-Stowe.



Samuel HAHNEMANN
(Kreinto de Homeopatio)

(El verko de H. de Morant, Konservisto de belar-
ta Muzeo en Angers « David d'Angers kaj lia
epoko »).



Barono Justus von LIEBIG
(Germana hemiŝto)

Ĉar li multe admiris la literaturistojn, li ofte helpis ilin, ne nur farante iliajn portretojn, sed ankaŭ financante iliajn eldonojn, malgraŭ la modesteco de siaj honorarioj.

Ĉar la 19a jarcento estis, de diversaj vidpunktoj, la jarcento de la Scienco, David d'Angers, popre valls reprezenti sciencistojn plej diversfakajn : La Place, Monge, Carnot, Arago, Becquerel, Fresnel, Cuvier, Lucépsge, de Jussieu, Lavoisier, Berthollet, Berzelius, Liebig, Chevreul, Mathieu de Dombasie, Ambroise-Paré, Bichat, Orfila.

Fidela je sia programo, ne lasi famajn samtempulojn sen modli iliajn trajtojn, David ankoraŭ faris ŝton-portretojn de kelkaj artistoj : Gericault, Ingres, Delacroix, Houdon.

Rimarkinde estas, ke virinoj estas preskaŭ ne-troveblaj en la verkaro de David d'Angers. Tamen, ne kredu, ke li estis neimpresebla de virinaj ĉarmoj : liaj intimaj notoj montras la kontraŭon. Li amegis junan aristokratan italino, kies gepatroj rifuzis edziĝ-konsenton kaj poste li edziĝis al nepino de fama franca respublikisto kaj vivis feliĉe. Sed, ĉar la ideo modli nur famulojn altrudas sin al li, ĉar la virinoj de la 19-a jarcento volonte lasis famon al viroj, la artisto konsekvence elektis plejparte virajn modelojn.

Tion oni povas bedaŭri, ĉar, inter liaj malmultaj virinaj statuoj, kelkaj estas altnivelaj : « La juna Grekino ĉe la tombejo de Marko Botzaris », « La videbla angelo de Pollando », « Sankta Cecilio », el marmoro, ornamo de la Angersa katedralo. Ankaŭ la infanoj estas esceptoj pro la samaj kaŭzoj, kiel la virinoj. Plej ofte, modeloj estas liaj propraj infanoj.

David d'Angers ne nur multe skulptis, sed ankaŭ multe pigensis kaj multe skribis pri siaj artoj kaj filozofio.

Varma respublikisto, li estis elektita kiel urbestro de parizadistrikto kaj deputito de sia naskiĝ-departemento « Maine-et-Loire ».

Laborante, li kutimis diri « Mi kontentigas mian koron, kiam mi provas konservi al la homaro memoraĵojn pri valora homo, iu ajn estu lia kredo. »

B. CHEREVY.

FINNA BANEJO "SAUNA"

Banejo apartenas al la vivo de Finnoj same esence kiel loĝejo. Laŭ statistiko 80 % el la familioj, kiuj posedas kamparan loĝejon, posedas ankaŭ banejon. La aliaj uzas la banejon de la najbaro, kaj la urbanoj vizitadas publikajn banejojn.

Originata finna banejo estas t. n. fumbanejo, kies forno ne havas kamentubon. La fumo plejigas dum la hejtado supran parton de la banejo kaj eliras tra pordo, fenestro kaj truo en la plafono. La interno en tia banejo estas nigra. Nuntempe oni nur malofte renkontas fumbanejon, sed kelkaj preferas ĝin, ĉar ĝi estas pli higiena pro la desinfekta kapablo de fumo.

La muroj de ĉiuspecaj banejoj estas lignaj aŭ almenaŭ krovitaj interne per nepentrila ligno. La publikaj banejoj havas ĉiam fornon kun kamentubo. En la forno ekzistas fajrujo kaj sur ĝi amaso da ŝtonoj tiel muntitaj, ke la fajro povas trairi la ŝtonaron. Nuntempe ekzistas ankaŭ per elektro varmigitaj banejoj fornoj, sed ankaŭ en ili ekzistas ŝtonaro « kiŭas ». Varmigo de lavakvo okazas diversmaniere.

Ordinare en familia banejo ekzistas du ĉambroj : antaŭĉambro por senvestiĝo kaj vestiĝo kaj la ĉambro. En publikaj banejoj ekzistas ankaŭ tria ĉambro por laviĝo.

En la ĉambro ekzistas supre larĝa bretego, al kiu kondukas pli aŭ malpli larĝa ŝtuparo, kaj sur bretego troviĝas ankaŭ benko. La detaloj de banejo same kiel tiuj de banmaniero estas diversaj. Banante sin en propra banejo oni ordinare unue kuŝas dum kelka tempo sur la bretego atendante komencon de ŝvitado. La aero tiam estas tute seka kaj la temperaturo laŭdezire 60-100 gradojn C. Tamen vidoj, kaj oni toleras sekan varmon super 100 gradoj, kaj oni toleras sekan varmon eĉ ĝis 140 gradoj. La « sekreto », kiu ebligas tion, estas la vaporigo de ŝvito, kio konsumas la varmon ĉe la haŭto. Ĉar termometro ne ŝvitos, ĝi montras la veran temperaturon.

Kiam la ŝvito jam bone elfluas, oni jetas iom da akvo sur la varmigitan ŝtonaron. Aĥdiĝas kotera sono : iŝŝs, kaj varmega akvogaso traflugas la ĉambron. Videbla vaporo ne aperas, se la ŝtonaro estas bone varmigitaj. La banantoj prenas betulbranĉan folikvaston kaj komencas per ĝi batadi sin. La ŝvitado fortiĝas kaj la poroj de la haŭto ĝisfunde puriĝas.

Ricevinte sufiĉe da varmo la banigantoj (ekzemple kampare) eliras por refreŝiĝi sin. Se la banejo

estas, kiel kutime, sur la bordo de lago aŭ rivero, oni iras por naĝi kelkan tempon. Vintre oni nur staras aŭ sidas kelkan tempon sur la korto antaŭ la banejo. La kutimo ruliĝi en neĝo aŭ trempi sin en glacia truo de lago vintre estas malofte, kvankam neniel danĝera se oni restas en akvo nur mallonge. La nombro de dumvintraj naĝantoj en glacia truo estas en la tuta lando ĉirkaŭ 10.000 kaj ili fondis kelkajn societojn. Al ili apartenas ĉiuajaj homoj de ambaŭ seksoj. La banigantoj reiras kelkfoje en la banejon kaj akvon. Se lago aŭ rivero ne estas proksime, oni superverŝas sin per malvarmeta akvo. Post la bano oni estas ruĝa kiel indiano kaj sentas sin freŝas kaj feliĉa. La spirado tra la poroj de la haŭto estas perfekte.

En publikaj banejoj la funkeintoj, kiuj laŭ peto kaj pago servas al la klientoj, estas same en vira kiel en virina fakoj maljunetaj virinoj. Ankorau en la fino de la pasinta jarcento estis kampare kutimo, ke ne nur familianoj, sed ankaŭ altaj viroj kaj virinoj banis sin kune, kaj oni vidis en tio ion maldecan.

En finna beletro la baneja procedo estas ŝatata temo. Aperis ankaŭ kelkaj teknikaj verkoj pri banejo kaj baneja kulturo, kaj en la jaro 1937 fondiĝis societo, kiu esploras sciencie la efikojn de banado. La sinbano en ŝvitbanejo estas por finnoj granda ĝuo kaj grava saniga rimedo.

En la jaro 1946 aperis 400-paĝa verko enhavanta pribanejajn eliraĵojn el la verkoj de multaj verkistoj kaj el popolo poezio. La verkintoj prilumigas la banejan kulturon el diversaj vidpunktoj. Plej multaj rakontas okazintaĵojn en banejo, sed aliaj laŭdas la ecojn kaj efikojn de banado.

Konata sporta veterano Martti Jukola skribas i. a. jenon : « Banejo apartenas al la vivkoncepto de finnoj. Ĝi estas parto de la legindaj paĝoj de nia historio... Dum la militoj ĝi (kaŝita en arbarego) estis rifugejo de popolo kaj helpis al ĝi konservi kredon pri libero kaj atendi estigon de nova lago... Por anstataŭi bruligitan hejmdomon oni ĉiam unue konstruis banejon... Banejo estis por nia popolo same grava kiel sekala pano... En ĝi la vivo de pra-arbara pioniroj komenciĝis kaj finiĝis... Dum laborplenaj jaroj oni serĉis en ĝi refreŝigon kaj ripozon... La efiko de banado transiras el korpo en la animon. En banejo ne eblas esti malbonhumora. Tie regas sincera kamaradeco kaj tie oni estas gaja kaj senpera... Vi, malnova banejo, estas por ni kara sorĉinstituto. ».

HANNES KOIVU.

LA INSULO

de l'OKCIDENTO

En la anglalingva originalo de JOHN MASEFIELD

Esperantigita de A.J. HUGUES

je la afabla permeso de la verkinto
(dua parto)

La beleco de tiu insulo superis la belecon de Sarnjo Brown, la virala biervendistino hejme. Kaj, sur la plaĝo, sidigis sur ora trono virino tiel belega, ke ekvido de ŝi valorus tiom, kiom diservo en preĝejo.

« Jen la ino, kiun mi devas kisi, diris Jerĉjo. Firme, Jakĉjo knabo, alterigu nin. Surterigu la boaton, junulo, jen mia reĝino. »

« Vi iĝis impertinentulo subite, ĉu ne? diris Joĉjo. Vi ne estas la virala ĉi floteo. Ne proksimume, vi tio ne estas. Mi kisas laŭnecese. Vi restu for, kamarado! »

« Ĉu for? respondis Jerĉjo, ĉu vi arogas al vi, ordoni al mi resti for? Se vi denove ordonos ion al mi, mi metos sur viajn ŝultrojn kapon kiu zumos same kiel bolilo. Kiu vi estas, ke vi al mi ordonu resti for? »

« Mi klarigos al vi, kiu mi estas, diris Joĉjo. Mi estas pli bona viro ol vi. Jen kiu mi estas. Mi estas Joĉjo la Tanko, el Limehouse-a Baseno, kaj neniu azenkonduktanta soldisto igos min foren. Vi kia estas, ke vi kisu reĝinon? Vi kia estas, ke vi tiel fiere kaj filmpone parolu? Via vizaĝo naŭzas Hispanon. Vi aspektas kiel marnaŭza kastro, kiu boksis kontraŭ zumsegilon. Viaj moroj estas porkaj, kaj viaj lipoj bruligas la emajlon el sur porkaj. »

« Rilate al insultegado, komencis Jerĉjo, vi ne estas la sola ŝtoneto sur la strando. Kion ajn vi opinias, mi diras al vi ĉi tion. Vi estas la maŝo kaj la du duonnoj de klaŭno, ke kiu ridegas la anĝeloj. Jen kiu vi estas. Kaj ankaŭ, vi estas la dekstra fadeneto, kaj la maldekstra fadeneto, kaj la meza fadeneto, kaj la kora fadeneto, kaj la ŝelŝnureto, de iu triŝnureta, maldekstremana, fuŝfarita rubaĵo de duone komencita, neniam finita restaĵo de Port Mahon-a soldato. Vi similas al portugala tamburisto. Via nazo estas ruĝa kaj bukenaspekta, kaj ĝi brilas kiel baborada ŝiplanterno. Via vizaĝo aspektas, kiel marĉa kampo, kie oni ludas futbalon dum pluva vetero. Viaj haroj estas insulto kaj hontaĵo. Rigardante vin, mi ruĝiĝas. Vi naŭzas min, kiel naŭzas novan mariston la unua surmara tago. Ĉu vi kisas? Ĉu vi? Mi diras al vi, ke vi paralizus ŝarkon, kiun vi provus kisi. Vi paralizus ĝin, ŝtonigus ĝin. Jen, kion efektivigus via kiso. »

« Vere, vi devus esti pastro, respondis Joĉjo, tio devus esti via metio. Al multe da uloj oni pagas

monon pro tia parolado. Sed, spite viajn imponajn vortojn, spite vian dandan lingvon, mi ne lasos al vi, aktori la malnovan soldaton super mi. Ne, nek al deko kiel vi. Ĉu vi parolas pri kisoj, kiam ĉestas bela junulo, kiel mi? Nek vi, nek deko kiel vi. Aŭdante vin, oni imagus imperiestron aŭ amiralon. Oni imagus episkopon aŭ reĝon. Oni povus mispreni vin por generalo aŭ parlamentulo. Certe, oni tiel povus. Generalo, episkopo, aŭ reĝo. Kaj kio vi estas? Kio? Mi klare respondos. Kio vi estas? Mi klarigos. Vi estas tiu, kiu sin dungis kiel birdtimigilon, por tio ke neniu volis vin dungi kiel mariston. Vi estas tiu kiu acidigis la bieron de Panjo Bomby. Vi estas tiu kiu kronigis la anason kaj ŝtelis la simlon. Vi estas tiu, al kiu oni aljuĝis medalon pro la vizaĝo kiu subigis la virbovon. Vi... »

« Nu, ne jetu vi pli al mi, interrompis Jerĉjo, mi ne akceptos malrespekton de iu deku-pro-ŝilngulo kiel vi. Vi estas la detranĉaĵo de ŝnurtaŭzaĵo, kiujn la Hispanoj fumas en cigaredoj. Skovelo, kaj ferdeka balailo, kaj duona pajnto da kolorilo faras pli bonan homon ol vi. Mi foje vidis kokosfibran broson, kiun oni uzis por netigi mulojn, kiu aspektis pli dolĉe ol vi. Do, flanken! Se ne, mi flankenmetos vin. Mi regos ĉi tiun insulon. Iru, ĉasu vin; Flankenstaru, mi diras, aŭ mi skuos vin tiamaniere, ke sonoros por vi la sonoriloj. »

Nu, dum ili tiel disputaĉis inter si, juna Jakĉjo, la metilernanto, forkuris en la direkton de la reĝino, sur ŝia trono. Belegulino ŝi estis, kaj ŝi brilegis en la sunlumo, kaj ŝi rigardis rekte antaŭe, kiel figuro en vaskmodelejo. Kaj en la mano ŝi tenis sakon plenan je juveloj, kaj ĉe la piedoj troviĝis sako plena je oro, kaj flanke staris vaka trono, atendanta la reĝon kun kiu ŝi edziniĝos. Sed ĉirkaŭ la dekstra brako kirliĝis ruĝa serpento, kaj ĉirkaŭ la maldekstra brako kirliĝis blua serpento; kaj la du serpentoj sibladis kaj tordiĝis, kaj grincis siajn venenplenajn dentojn. Do, Jakĉjo rigardis la serpentojn, kaj li forfrapis ilin, dekstren kaj maldekstren, kaj li kisis la virinon.

Kaj tuj ĉu sonorilo, ĉu birdo de la mondo eksonoris kaj ekkantis. La ŝinorino ekvekiĝis el sia dormo, kaj la ĉifonoj de Jakĉjo fariĝis oraj tolaĵoj. Kaj, jen li, reĝo, sidiginta sur la trono, flanke de la ŝinorino.

Sed la ruĝa serpento fariĝis granda ruĝa demono, kiu ekkaptis Joĉjon, kaj la blua serpento fariĝis granda blua demono, kiu ekkaptis Jerĉjon. Kaj — « Venu ĉi tien, vi riskantaĵi simioj, ili diris, venu vi kaj ŝovelu sablon ». Kaj Joĉjo kaj Jerĉjo akceptis la proponitaĵon ŝovellilojn. Kaj « Fosu vi, kriegis la demonoj, laboru! Ni vidu vin fosi! Fosadu, vi ĉifonfiguroj! Kaj avertu al ni, kiam vi elfosos ĝis Londono! »

PRONONCADO

KAJ SKRIBADO

Estas iom malfacile por la moderna homo imagi la longan periodon kiun devis travigi la Homaro ĝis doni ĝustan formon al la plej kompleta el siaj kultur-elementoj : la Lingvo. « La lingvo estis kaj estas ankoraŭ longa vojo al la perfekteco », laŭ Pro. E. Relano.

Rigardante Egiptujon, Mezopotamion kaj Cinion, ni povas vidi pli-malpli ĝuste, kio estas la evoluo de la skribado. Ni scias ke la unuaj provoj estis simplaj desegnaĵoj, kies signifo ne ĉiam estis reala. Ankaŭ ni konstatas kiel tiuj desegnaĵoj evoluis iom post iom kaj kiel en la diversaj regionoj kaj landoj ili diferencigis atingante tiel malsimilajn rezultojn.

Ĉiuj antikvaj popoloj suferis la saman procezon. Ili ĉiuj iris de la desegnado al la simbolo, estigante tiel la diversajn nun konatajn skribmanierojn. Tamen ne ĉiuj alvenis al la sama rezulto. Ekzistas ankoraŭ rasoj neeligintaj el la piktografian etapo. Kelkaj amerikaj gentoj ne konas alian skrib sistemon ol piktografian reprezentadon pli-malpli ĝustan de tio, kion ili deziras esprimi. Aliaj, ekzemple la ĉinoj, inventis skrib sistemon intence ke ĉiu signo reprezentu ideon kaj ke ĉiu ideo estu ĉiam reprezentata de la sama signo. Aperis la neebleco parkere reteni tiom da signoj, kaj tio originis la artan kaj malfacilan sistemon, kiu estas ankoraŭ nun la bazo de la ĉina skribado : la radikaj simboloj kaj aliaj derivaĵoj. Post tio, la evoluo de la ĉina skrib sistemo haltis.

Kaj fine aliaj, surbaze de la piktografia reprezentado iris al la simbolo, poste al la fonetika, ĉu silaba kiel la kjojforma kaj la japana « kana » ĉu alfabeto kiel la latina kaj la greka, ĉu kombinate simbolojn kaj vortojn kiel la moderna japana lingvo.

Vidinte tion ni tuj konkludas ke « ĉiu popolo, aŭ pli bone, ĉiu lingvo, celis trovi la sistemon reprezentante siajn vortojn kaj frazojn, kaj ĉiu haltis en la serĉado tuj post la trovo de tiu pli-malpli kontentiga. Ĉiu antikva lingvo devis trankvili, do, la tutan propran vojon.

Post la konsilio pri la neceso reprezenti la diversajn sonojn per konvenciaj signoj, daŭris, tamen, la sistemdiverseco. Samkiel ĉiu lingvo evoluis malsimile al la alifamiliaj, eĉ kelkfoje malsimile al la parencaj, ankaŭ ĉiu kreis sian tipan alfabeton, aranĝitan laŭ la karaktero de la lingvo. Ni vidu, kiel iuj skribas de dekstre maldekstren, aliaj de maldekstre dekstren, de supre malsupren, k. t. p... La semidoj, kies lingvoj ne estas tre klaraj vokale, aranĝis nombregon da malsimilaj alfabetoj, kompostitaj sole per konsonantoj. Male, la grekoj, kies lingvo estas tre riĉa je vokaloj, donis al ĝi sufiĉajn signojn por klare reprezenti skribe la parolaĵojn. La grekan alfabeton oni devas konsideri kiel unuan inter la nomataj « okcidentaj » kaj « modernaj ». Fidelege oni povas per ĝi reprezenti ĉiujn grekajn sonojn. Tamen, la greka alfabeto estis tre taŭga por skribi greke, ne por skribi alilingve.

Post la greka, estis dotataj je alfabeto aliaj lingvoj ankoraŭ ne posedantaj ĝin. La homoj, kiuj havigis alfabeton al la latina, gotika, slava, ne limigis sian laboron kopianta aŭ aplikante la grekan alfabeton de la alfa ĝis la omega, ne ! tute ne ! Ili inspirigis en la greka lingvo-alfabeto, kaj deziris imiti ĝin, farante simplan similaĵon. Vidinte, ke la kostumo bone aspektis sur la greka lingvo, ili deziris fari similan kostumon sed, kompreneble, alimezurane. La pli modernaj limigis la taskon al la akto de la ŝatataj kostumoj, sed ne pensante ĉu la portinto estis pli alta aŭ malalta, dika aŭ maldika, kaj tiel ili adoptis la Romian skribsignaron.

Kiam Wulfila pensis pri gotikigo de la Biblio, kaj kiam Sankta Cirilo same agis rilate al la slava, unu kaj la alia devis krei la necesajn alfabetojn por la verko, kiun ili entreprenis. Anstataŭ adepti la grekajn kaj latinajn literojn al la slavaj kaj gotikaj vortoj, ili sekvis konstruadon procezon : unue studi la reprezentotajn sonojn kaj poste inventi la adekvatan abocion por ili. Malaperinte la gotika aboco, restas la slava, tiel taŭga kaj perfekta por skribi ruse aŭ serbe.

Tamen, kiu diskutos kaj asertos, ke la latina alfabeto povas reprezenti, sen uzo de artifiko, la komplikajn fonetikon de la franca, kaj tiun plej komplikan de la angla lingvoj ? La latina alfabeto estis kreita por skribi latine nur.

Kaj nun ni vidas, kiel malfacile estas korekte skribi per la modernaj vivantaj lingvoj. Car ne sufiĉis la latinaj karakteroj, tiel sufiĉaj kaj klaraj por skribi per la latina lingvo, oni devis elpensi la diversajn akcentojn, literkombinojn kaj ĉiajn artificojn por eviti la mankon, originante per tio la malfacilan ortografion de lingvoj tiel multe studataj tutmonde kiel la franca kaj angla unugrade, kaj dua-grade preskaŭ la tuta restanta lingvaro. Nur en la lingvo Esperanto ĉiu signo reprezentas sonon, kiu ĉiam estas reprezentata per la sama signo.

P. JULIA.

(Bibliografio : Prof. E. Relano. — « Babel, las lenguas del mundo » — Buenos-Aires, 1946).

Jen, okazo por restadi SENPAGE en la Esperantista Kulturdomo. Partoprenu

NIAN KONKURSON.

(Vidu paĝon 12)

TRA LA ESPERANTA LITERATURO



VALLIENNE Henri

Franco - Dro kuracisto

Li naskiĝis la 19-an de Novembro 1854 en Saumur, kaj mortis apud Parizo en 1908. Karlo Bourlet skribis en « La Revuo », en 1908 : « Li estis altkreska, fortika, larĝsultra viro, kun sufiĉe longaj haroj kaj barbo, griznigraj, akrevidantaj okuloj, severa mieno. En tiu korpo de mezepoka kavaliro batis plej sentema, kaj bona koro, en tiu kapo de kaperisto logis cerbo de altpensema scienculo. »

Laŭprofesie kuracisto, Vallienne multe interesiĝis ankaŭ pri literaturo ; li estis publikiginta volumon da poemoj en franca lingvo, kiam li ekkonis esperanton en 1903. La literaturaj kvalitoj de Esperanto entuziasmigis lin kaj tuj li ekuzis ĝin por tradukado de granda verko : « Eneido » de Virgilio. En Aprilo 1905 kruela kormalsano atakis kaj preskaŭ mortigis lin. Post la krizo li ne plu povis eliri el sia ĉambro nek forlasi sian apogseĝon. Sed tiun kompatindan situacion li profitis por akceli sian esperantan laboron. En 1906 li publikigis la plenan tradukon de « Eneido » en 1907 la originalan romanon « Kastelo de Prelongo », en 1908 alian : « Cu li ? » kaj samjare la tradukon de la tradukon de la verko de Richet « Paco kaj Milito », originalan artikolon « Evoluco de la religia ideo » kaj propagandan broŝuron « Por kaj kontraŭ Esperanto ». Cetero li postlasis manuskriptojn de komedio de Musset « Margot » publikigita en Franca esperantisto (1909), kaj la sekvantaj nepublikigitaj : « Kaprico » kaj « Oni neniam pri io devas juri », ambaŭ de Musset ; « Aventuroj de Telemako » de Fenelon, kaj la « Metamorfozoj » de Ovido, laŭverse tradukitaj.

En « Enciklopedio » Pr. Waringhien skribis : « Vallienne estas la unua, kiu skribis originalajn romanojn en esperanto. Antaŭ li ekzistis ja kelkaj noveloj, sed dikaj verkoj da 450-500 paĝoj neniam estis ankoraŭ skribitaj. Verdire la enhavo de liaj romanoj ne estas tre altinspira. Ili apartenas al la plej malbona speco de la felietaona literaturo kun krimoj, incendio, misteroj, nobelino senvirigita aŭ identkonfuzoj pro ĝemela simileco, forkuroj, juĝista eraro, dubla kaj paradokse senkulpa adulto, ĉio plena je neatenditaĵoj, sena je la plej elementa psikologio, kaj tie aŭ tie-ĉi spicita de sensotikaj aludoj. La sola neordinaraĵo estas la pecoj, kie la aŭtoro malkaŝas sian profession per disertoj pri medicino ».

En la antaŭparolo de la romano « Cu li ? », Kalocsay skribis : « Kian ajn opinion oni havas pri la arta valoro de la romanoj de Vallienne, estas sendube, ke ili havas en nia lingvo gravan historian valoron. Kion oni ne povas kontesti, ke ili estas interesaj : oni povas ilin legi kun konstanta scivolo kaj atento. Ili ja apartenas al la t.n. felietaona literaturo, sed kiel tiaj, ili nepre taŭgas. »

Elĉerpajo el « La kastelo de Prelongo » de

Vallienne

Jam de tri tagoj, Gastono dormadis en sia ĉerko sensongan dormegon, kiam li vekigis. Mirante pro la tomba silento, kiu lin ĉirkaŭis, pro la profunda senlumeo en kiu li sentis sin kvazaŭ dronintan, li volis sidigi. Sed, ĉar lia kapo renkontis la kovrilon de la ĉerko, li refalis sur la dorson. Per la mano li palpetis ĉirkaŭ si kaj rapide komprenis tion, kio okazis... Por ke li ne fariĝu tro mirigita se tiu entombigo reale okazus, li kutimis provi ĉiumonate ripetadon de la ekzerco, kiun li faris en tiu momento. Li do sen malfacileco retrovis impreson al kiu li estis sin kutimiginta. « Nu » li diris, « mi estis enĉerkgigita kvankam vivanta. Tio estis okazonta ĉu pli, ĉu malpli frue, sed fatale neevitebla. » Tamen nevole li tremetis de la kapo ĝis la piedoj. « Br... », li balbutis. Felice mi uzis ĉiujn antaŭzorgojn necesajn. « Li serĉis siajn brelokojn kaj ilin trovis. Post kelkaj palpetoj li sentis en siaj fingroj la ŝlosilon, kiu ebligas la malfermon de la ĉerko. Tiu laboro plene sukcesis. Kiam la kovrilo estis levita, la duk saltis ekster sia ĉerko. Genufleksante li dankis Dion per mallonga preĝo. Poste li brue spiradis. Tiam li levis la matracon, sur kiun li estis kuŝigita. La ĉerko enhavis duoblan ujon en kiu troviĝis kaŝejo, kies neniuj povis suspekti ekziston. Gastono ĝin malfermis. Li eltrovis el ĝi alumetskatoleton kaj kandelon, kiun li ekbruligis tuj. Kiam la lumo estis forpelinta la senlumecon, li sin direktis al angulo de la funebra kelo kaj serĉis kupran butonon kaŝitan en la muro... La duko premis la butonon kaj ŝtonplato turniĝis sur sin mem naskante spacon sufiĉe larĝan. Sinjoro de Blazano surrampis la ŝtuparon, sin ŝovis tra tiu malfermaĵo kaj penetris en la kapelon. »



POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO 1960 - 61

Ci sube ni denove priskribas le regularon de nia konkurso :

1. — En ĉiu numero aperonta de « Kulturaj Kalendaroj » vi trovos problemojn, ĉu enigmon, ĉu krucvortojn, ĉu tekston entenantan erarojn kiujn vi devos korekti aŭ punktojn anstataŭigotajn per taŭgaj vortoj. La ĝustigitajn tekstojn sendu la konkurstantoj al : **S-ro P. Chevalier, 19, Boulevard G. Lauriol, Nantes (L.-A.), Francujo**, antaŭ la 15-a de la monato sekvanta tiun de la apero de la gazeto (do, antaŭ la 15-a de Novembro por tiu ĉi numero, antaŭ la 15-a de Januaro por la sekvonta, ktp.) Pliaj facilaj povos esti akorditaj por malproksimegaj konkurstantoj.

2. — Nur la abonintoj al la revuo rajtas konkursi.

3. — La du gajnintoj de la antaŭaj konkursoj povas partopreni la ĉijaran konkurson, sed ili ne povos gajni denove la premiojn.

4. — La premioj konsistas el : a) 15-taga senpaga restado en la Esperantista Kulturdomo, Kastelo Grésillon, Francujo; b) 8-taga restado en la Esperantista Kulturdomo.

5. — Se pluraj konkurstantoj ricevos la saman nombron da poentoj, la premioj estos lotitaj inter ili.

1-a Problemo

En la suba rakonteto estas dek lingvaj eraroj. Trovu kaj korektu ilin. La solvoj estos premiataj per 1 poento por ĉiu eraro korektita :

« Surpriza rezulto — La nokta flegistino eklogis en novan pensionon sed dum la tuta tago estis tiel infera bruoj, ke ŝi eĉ ne unu minuton povis dormi kaj tial vespere ŝi devis iri al siaj pacientoj, ellaciĝinta kaj kun kapdoloro. Ŝi plendis al iu kuracisto, kiu konsilis, ke ŝi ne ĝenu sin, sed kurage petu la domojn, ke ili pensu pri ŝi. La flegistino sekvis la konsilon. Ŝi prenis foliojn paperojn kaj surskribis : Bonvolu pensi pri la nokta flegistino ! Dankon ». Kaj ŝi metis la paperojn sur la tabletojn en la halo de la domo. Sed imagu ŝian miregon, kiam en la vespero de la sama tago, elronte al siaj pacientoj, ŝi trovis sub la papero tri argentajn monerojn kaj unu bankbileton ! »

2-a Problemo

Nombra Enigmo (20 poentoj)

Ĉiu nombro signifas unu literon. La solvo konsistas el 60 literoj. La ŝlosilvortoj estas :

VERDASTELO

9, 6, 26, 39, 2, 13, 14, 12, 27, 4 : esperantista insigno.

KURACĈO
51, 41, 42, 10, 59, 60 : soldata virto.

LUXENBURGO
16, 53, 11, 48, 49, 50, 39, 21, 53, 8 : okcident-eŭropa ĉefurbo.

PERPENTO
37, 38, 31, 29, 30, 5, 35, 36 : senpieda surtera besto.

RINOCERO
45, 46, 47, 33, 3, 56, 55, 52 : nazkorna bestego.

KONTAKTABASO
32, 4, 34, 17, 25, 1, 15, 23, 19, 8 : granda muzikilo.

PAGANJONI
7, 28, 20, 2, 57, 58, 40, 18 : itala violonvirtuozo.

REFARAJ
26, 15, 24, 44, 22, 18 : denove fari la samon.

ALPREZA SPICAJO
43, 46, 54, 31, 60 : altpreza spicaĵo.

1, 60 : vortoj de profesoro Albert Einstein.

Rimarko. — Ni atentigas ĉiujn konkurstantojn, ke la solvoj de la du problemoj ili devas sendi antaŭ la 15-a de Novembro.

SOLVOJ DE LA AMUZAJ PROBLEMOJ

APERINTAJ EN LA LASTA NUMERO

La cigaredstumpoj : kun 9 stumpoj la viro faras 3 cigaredojn kaj restas al li 1 stumpo. Kiam li fumis la tri cigaredojn al li restas $1 + 3 = 4$ stumpoj. Per tiuj 4 stumpoj li faras 1 cigaredon, ĝin fumas, kaj restas 2 stumpoj. Li pruntas 1 stumpon de amiko, fumas la kvinan cigaredon kaj redonas la stumpon al la amiko. La respondo estas : 5.

La insekto : La unua folio de la unua libro estas kontraŭ la dua libro kaj la lasta folio de la tria libro estas ankaŭ kontraŭ la dua libro. Do, la insekto trairas nur la duan libron : 3 cm.

La heliko : Post unu tago kaj unu nokto la heliko altiĝas de unu metro. Post 9 tagoj kaj 9 noktoj ĝi altiĝas de 9 metroj kaj dum la deka tago ĝi grimpas la 3 lastajn metrojn kaj atingas la supron de la fosto. La respondo estas : 10 tagoj kaj 9 noktoj.

(La solvo de la kvara problemo aperos en la venonta numero kun novaj amuzaj problemoj).

Le Gérant : H. MICARD


IMP. COCONNIER, SABLÉ

LA JUNAJ

DETEKTIVOJ

ILUSTRITA RESUMO DE LA NOVELO DE J.H. SULLIVAN

(4-a parto)



Venis jaŭdo. En la silento kaj mallumo la infanoj atendis. Subite, je la noktomezo, ili aŭdis paŝojn. « Mi metis kapkuse non en mian liton. Faru simile ĉar eble Onklino rigardos en nian ĉambron », diris Andreo.



La infanoj eliris, grimpis trans la tegmento de la lignobudo kaj saltis al la tero. Kelkajn metrojn for ili povis vidi la formon de la farmisto. Ili sekvis.



Tra la kampoj, inter la montetoj, la gemeloj iris iom timeme. Subite la onklo malaperis. « Vidu tiun arbeton kun ŝtonego. Estas truo en la tero malantaŭ ĝi », flustris Lizbeto.



Andreo kaj Lizbeto eniris la subteran tuncelon. Ĉe la fino de tiu tuncelo voĵeto iris sub la akvofalon kaj al alia tuncelo. Tio estis la sekreta vojo de la kontraŭbandistoj !



Subite apudaj voĵoj sonis. Du viroj sidis en angulo. La gemeloj atendis malantaŭ ŝtonego. La onklo revenis kun granda pakajo. Li ne vidis la infanojn.



« Restu tie-ĉi Lizbeto. Mi volas rigardi tiun vojon. » Andreo plu iris. Sed subite : « Kion vi faras ĉi tie ? » diris viro, kiu kaptis la knabon per la brakoj ; « se mi estus murdanto mi puŝus vin en la akvofalon ! »

(Represita kun permeso de la aŭtoro kaj de la eldonistoj de « La Junaj Detektivoj ». La libro (43-a paĝa novelo kun 9 ilustraĵoj de Brenda Goodwin) estas aĉetebla ĉe Esperantaj Libroservoj, aŭ rekte ĉe la eldonistoj, The Esperanto Publishing Company Ltd., 100 Long Lane, Rickmansworth, Herts. Anglujo, po 4 int. respondukoponoj.)

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (20 aŭst. ŝil.).

Belgujo : F-ino S. Obozinski, avenue Brugmann 364, BRUXELLES 18.

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (6 ŝil.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (2,5 guld.).

Germanujo (Okc.) : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33 (3 mark.).

Germanujo (DDR) : S-ro Ernst Muthschall, 19a) HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (5 mark.).

Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (40 pes.).

Italujo : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (450 liroj).
Itala Esperanto-Federacio, Corso G. Galilei, 22, TORINO.

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (6 kr.).

Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Cothersgade 158, Kopenhago K (6 kr.).

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (30 Złotoj).

Svedujo : S-ro Rune Palmgren, Persikogatan 32 III, Stockholm-VALLINGBY (4 kron.).

Svislando : S-ro Pierre Metivier, Via Ferrera, Ascona (Tes.) (3 sv. Frank.).

Aliaj Landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (11 st.), aŭ respondkuponoj (8 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncittajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponon al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo